

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

“Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue” (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **arena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 94 - n. 4
LUGLIO-AGOSTO 2015

UECI-kongreso 2015

Ĉi jare nia kongreso okazis en Sestri Levante, ĉe la domo Opera “Madonnina del Grappa”, (t.e. la sama domo kie gastigis nin en 2007) de la 22a ĝis la 25.a da Majo. La aliĝintoj estis malmultaj (27), sed la partoprenantoj pli malmultaj (19). Kial tiel malmultaj? Ĉu nia maljuniĝo?, ĉu la ŝanĝo de la kongresejo de La Spezia al Sestri? ĉu la ekonomia krizo? Eble ĉiuj ĉi estis la kaŭzoj. Krome, lastmomente okazis pluraj malsanoj, kiuj malpermesis la alvenon de 8 personoj. Malgraŭ tio la kongreso bone progresis.

Vendredon la 22an de Majo posttagmeze kunvenis la kongresanoj por la enloĝiĝo, la vespermanĝo kaj la interkona vespero.

Sabato estis dediĉita al la temo de la kongreso “*Sinodo pri la Familio*” kun prelegoj de Giovanni Daminelli kaj Norma Cescotti kaj amuziga intermezo de Gianni Conti pri sia persona interpreto de la “*Dia Komedio*”.

Dimanĉon matene okazis la jara asembleo de UECI kun la elekto de la nova estraro. Sekvis la

Sankta Meso de Pentekosto. Posttagmeze ni ekskursis per ŝipo al Abatejo de San Fruttuoso kaj al Portofino. La tago finiĝis per la adiaŭa vespero.

Lundon matene ni renkontiĝis por konkludi la jaran asembleon, prezenti la novan UECI-estraron kaj eltiri la konkludojn de la temo pritraktita.

Kiel kutime, ĉiutage ni preĝis la Matenajn Laŭdojn, la S-tan Meson kaj la Vesperajn laŭdojn.

Detaloj pri la jara asembleo je la paĝo 12.



Portofino, antaŭ la preĝejo de S-ta Marteno: Giovanni Gazzola kaj Felice Sorosina kun nia plejaĝulo: Mario Gedda (93-jara)

"DE LA KOMENCO NE ESTIS TIEL"

Prelego de Giovanni Daminelli en Sestri dum la UECI-kongreso 2015

Riassunto: Nei vangeli di Matteo e Marco Gesù, interrogato dai farisei se fosse lecito ripudiare la propria moglie, risponde che ciò era stato permesso da Mosè per la durezza del loro cuore, ma in principio non era così. Prendendo spunto dalla creazione dell'uomo, fatto ad immagine di Dio, descritta nelle due diverse narrazioni della Genesi, si mostra come il legame d'amore tra l'uomo e la donna è immagine del Dio trinitario, quindi come Dio è uno l'uomo, la donna uniti nell'amore matrimoniale diventano una cosa sola (una sola carne).

La titolo de mia prelego inspiriĝas al epizodo rakontita de la evangeliistoj Mateo kaj Marko en kiu la farizeoj pridemandas Jesuon.

*Venis al li Fariseoj, provante lin, kaj dirante: «Ĉu estas permesate forsendi sian edzinon pro ĉia kaŭzo?» Kaj responde li diris: «Ĉu vi ne legis, ke en la komenco la Kreinto faris ilin vira kaj virina, kaj diris: "Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino; kaj ili estos unu karno"? Sekve ili jam estas ne du, sed unu karno. Kion do Dio kunigis, tion homo ne disigu». Ili diris al li: «Kial do Moseo ordonis doni eksedzigan leteron, kaj forsendi ŝin?» Li diris al ili: «Moseo, pro la malmoleco de via koro, permesis al vi forsendi viajn edzinojn; sed **ne estis tiel de la komenco**».(Mateo 19, 3-8)*

(Simila estas la rakonto de Marko 10, 2-9)

Kio estas la komenco?


Ni legu en la libro de la Genezo (1, 26-28) la kreadon de la homo:

*Dio diris: «Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro, kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero». **Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo; laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.***

Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: «Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron;...».

Notu bone: Se la homo eliris el la manoj de Dio, respugante en sia aspekto la trajtojn de sia Kreinto, ni povas retroiri, al la realaĵo

mem de Dio: la realo de Dio estas kaŝita en la bildo (homo). Surtere, la bildo de Dio plej apuda al la perfekteco estas la homo.



La viro Adamo kompletigita de la virino Eva, edzo kaj edzino, estas karno ununura.

Pro tio unu el la vojoj por ascendi de la kreitaĵo al la Kreinto estas enpenetri la homan geedzan amon kaj legi en ĝi la amon de Dio.

Paroli pri geedziĝo kaj pri familio estas paroli pri amo. Tiu vorto estas ĉe ĉies buŝo, sed ĝia signifo varias laŭ la pensmaniero, laŭ la kulturo, laŭ la unuopula konduto kaj laŭ la religiaj konvinkiĝoj kaj la moralaj principoj.

Kia estas la kristana amo?

La kristana amo nomiĝas *karitato*. Jen la priskribo de Sankta Paŭlo (1 Kor. 13, 4-7):

Amo longe suferas, kaj bonfaras; amo ne envias; amo ne fanfaronas; ne ŝveligas sin, ne kondutas nedece, ne celas por si mem, ne koleriĝas, ne pripensas malbonon, ne ĝojas pri maljusteco, sed kunĝojas kun vereco; ĝi ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas.

La karitato havas siajn radikojn en Dio, ĉar Dio estas karitato; ekirante de Dio, ni sukcesas atingi la komprenon de la karitato.

Ni prikonsideru alian komenco, tiu de la evangelio de Johano, komenciĝas tiele:

En la komenco estis la Vorto kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la vorto estis Dio.

Por la evangeliisto Johano, la *Vorto* de Dio korespondas al tio, kion oni intencas esprimi dirante *Filo* de Dio. *Vorto* kaj *Filo* estas du imagoj por indiki rilaton de personoj ene de la ununura Dio.

Pro tio, ke nenia homa vorto povas precize kaj plene difini la esencon kaj la vivon de Dio ni uzas plurajn terminojn. La *vorto* estas parto de la homo, de ties vivo. Pere de vortoj ni esprimas niajn pensojn, ni eldiras nian amon. La vortoj ne estas ekstere de ni, ili estas esprimo de nia penso, manifestiĝo de niaj plej internaj sentoj. Niaj vortoj estas iamaniere ni mem.

Dio estas senlima amo. De la eterno li elmontras sian amon prononcante unu Vorton, tiu vorto estas *la Filo*.

En la libro de la Genezo estas dua rakonto de la kreo de la homo. Unue li kreis la viro el polvo de la tero kaj poste el li kreis la virinon (Gen. 2,22-24):

Kaj Dio la Sinjoro konstruis el la ripo, kiun li prenis de la homo, virinon, kaj Li venigis ŝin al la homo. Kaj la homo diris: «Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita.» Tial la viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno.

Ĉi tiu rakonto celas montri, ke viro kaj virino estas ja du estaĵoj, sed ili estas kreitaj

por iĝi ununuraĵo. La unuo viro-virino en la geedziĝo ne estas simple duopa societo, sed origina unuaĵo.



La homa seksemo estas bildo kaj similo de Dio, ĉar ĝi estas en si mem fekundeco kaj unueco, tiel kiel Dio-amo estas kaj fekundeco kaj unueco.

Amo fekunda en la rilato edzo-edzino, tendencas unuigi ĉiujn fruktojn, kiujn ĝi donas: kiel la du geedzoj estas karno ununura, tiel gepatroj kaj filoj estas familio ununura!

Maskleco kaj femaleco ne estas simple du enkarniĝoj de la ununura homa estaĵo, du apartaj kaj sinkompletigaj korpaj ecoj. Ili estas ankaŭ du manieroj, travivi la misteron de la bildo-similo al Dio, por plenigi tiun solcon, kiu ekde la komenco karakterizis la staton de la homo, nekapabla interkomuniki kun Dio, ĉar tro alta, nek kun la brutoj, ĉar mankaj de inteligento kaj amo.

Doni la nomon al la brutoj signifas la povon de Adamo super ĉia vivantaĵo tamen tio lasis lin sola. Adamo ne povas dialogi kun la brutoj kaj kun la plantoj. Li estas supera, sed sola! Li bezonas estaĵon al li simila, li bezonas dialogon, li bezonas aliancon, li bezonas ian apartenecon, li bezonas ian konsekriĝon.

Sed al la homo – al Adamo – ne sufiĉas havi aliulon, al li egala, ĉar pliobligante la nombron oni ne kreas amon, komunecon, dia-

logon, aliancon. Li bezonas estaĵon, iel malsaman, kiu portas plenecon, kiu kompletigas.

Ĉi tiu stato de la viro kaj de la virino povas helpi nin kompreni – almenaŭ supraĵe – kial la mistero mem de Dio estas samtempe mistero de Unueco kaj de Triunuo:

– Dio estas amo, pro tio Li estas fekunda, Li donas sin: Tri personoj t.e. Triunuo.

– Dio estas amo, pro tio Li celas al la komuneco: Unueco (sed ne soleco).

Foje okazas ke la geedzoj sentas sin solaj: ili ne interkomunikas, ne atingas la kontentiĝon, kiu devus origini de tiu interligo, kiu el la du faras ununuran karnon, ununuran spiriton, ununuran volon, ununuran strebon kaj ununuran amon.

Maskleco kaj femaleco estas du ekstretoj de pli profunda komuneco; ili elmontras distingon kaj kompletigon, kiu postulas komuncon kaj reciprokan sinoferon.

Pro tio – kontraŭe al la gepatroj, kiuj ne elektas siajn filojn kaj al la filoj, kiuj ne elektas siajn gepatrojn – la geedzoj elektas unu la alian, serĉas unu la alian, inter si ili faras komparojn, ili allogas unu la alian, ili preparas sin por vivi *porĉiame* sian reciprokan sinoferon-konsekriĝon.

La homo komunikas per la vorto, per la rigardo. Sed la homo interkomunikas ĉefe per la korpo kaj pere de la korpa nudeco; ĉi komunikado estas tamen gvidata kaj defendata de la pudoro, pro tio, ke la peko enestas en ĝi.

La nudeco de la viro kaj de la virino, origine, ne provokas disiĝon inter korpo kaj animo, inter karno kaj spirito: ankaŭ ne inter masklo kaj femalo: ĝi eĉ estas perilo de sinofero plena kaj senpostula.

Ĝi ankaŭ preparas kaj allogas al la sinofero. Ĝi estas fonto de vera kaj purega konsekriĝo, de alianco (se vi perceptas la sekson, kiel io, kio estas *por vi*, vi estas egoisto, vi ne estas sinofero, vi ne amas).

La peko (kiu estas egoismo, ribelo) rompis ĉi harmonion. La sindono elnatoriĝis kaj

fariĝis posedemo, egoismo. Multaj geedzoj ne perceptas tion klare, sed ili ja bone kapablas distingi, kiam ilia amo estas donaco, kaj kiam ĝi estas posedemo.

La reciproka sinofero, esprimiĝas kaj konkretiĝas pere de la videbla marko de iliaj seksohavaj korpoj kaj de ilia perfekta, integriga kaj reciproke kompletiga unuiĝo. En tia unuiĝo, viro kaj virino apartenas tute unu al la alia, en plena kaj harmonia trajto de siaj propraj subjektiveco kaj personeco al la subjektiveco kaj personeco de la alia.

La korpo iĝas la templo en kiu oni celebras la sakramenton de ĉi tiu unuiĝo. La korpo estas necesa, por ke la reciproka sindonado en la amo estu ebla, videbla, vera kaj plena.

Ĉiun fojon, kiam viro kaj virino kuniĝas, ĝis ili formas ununuran karnon, ili rekondukas la homaron al la momento de la origino: temas, iel, pri partopreno en la dia krea ago: la nasko daŭrigas kaj evoluigas la kreadon.

Pro tio necesas, ke la geedziĝo enhavu la nerezigneblajn ecojn: tiujn de la fideleco kaj de la agnosko flanke de la komunumo.

Unu el la esprimoj, la plej profundaj de ĉi tiu reciproka sindono-alianco inter viro kaj virino ĉerpiĝas en tiu, kiu estas kutime nomata la *ekstazo de Adamo*, la miro, kiu lin ekfrapis, kiam li vidis apud si, estaĵon al si simila, «osto el liaj ostoj kaj karno el lia karno».

En tiu ekstazo, kiu ripetiĝas ĉiufoje kiam viro kaj virino apudiĝas en la signo de la kora pureco kaj vera amo, ĉiu vidas en la alia, la kompletigon de sia propra estaĵo, de siaj plej profundaj ambicioj, de la deziroj.

En la ekstazo de sia unuiĝo, viro kaj virino perceptas sian egalecon plenan, universalan, nedetruan.

En Dio, Patro kaj Filo kaj Sankta Spirito estas egalaj, sed: la Patro *donas* (naskante la Filon), la Filo (naskigita de la Patro) *ricevas* kaj *donas*, la Spirito nur *ricevas*.

En simila maniero ni vidas: la viron, kiu *donas*, la virinon, kiu *ricevas*, gardas kaj *transdonas*, la filojn, kiuj nur *ricevas*.



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

TESTIMONIARE LA VERITÀ

Tempo addietro la parola data da un uomo impegnava la sua reputazione. Oggi sembra di vivere in un mondo fatto di recite e proclami, lontani dalla realtà effettiva.

Affamati come siamo di emozioni passeggere e affascinanti, troviamo molte difficoltà a camminare con i piedi per terra, accettando limiti e miserie senza eccedere in niente. Per quanto risulti molto bella la vita del nostro tempo, abbiamo la strana impressione di essere continuamente imbrogliati, tanto da dover ricorrere alla menzogna.

Da qui il bisogno di mettere un freno a questo stile di vita, troppo concentrato sugli interessi immediati. Nel libro dei Proverbi troviamo un esteso elenco delle varie falsità nelle quali l'uomo sprovveduto cade con facilità, aggravando la relazione con gli altri: *«Ecco, sei cose odia il Signore, sette ne detesta: occhi alteri, lingua bugiarda, mani che versano sangue innocente, cuore che ordisce trame malvagie, piedi solleciti a correre al male; testimone bugiardo che diffonde menzogne, e chi provoca risse in mezzo ai fratelli».* (Prov 6,16-19).

Troppo predisposti alla falsità e al doppio gioco, ci è stato dato l'ottavo comandamento: *«Non pronunciare falsa testimonianza contro il tuo prossimo»* (Es. 20,16). Con questo comandamento ci viene richiesta una particolare attenzione: quella di evitare almeno di testimoniare il falso a danno di altri. Che nelle nostre relazioni si ricorra spesso e volentieri a bugie e a falsità risulta

ATESTI LA VERON

Iam la vorto dirita de homo engaĝadis sian reputacion. Hodiaŭ ŝajnas, ke ni vivas en mondo farita je recitadoj kaj proklamoj, malproksimaj de la efektiva realo.

Malsataj kiaj ni estas je efemeraj kaj ĉarmantaj emocioj, ni trovas multajn malfacilaĵojn por marŝi kun ambaŭ piedoj sur la tero, akceptante limojn kaj mizerojn sen troi pri nenio. Kvankam la nuntempa vivo estas tre bela, ni havas la strangan impreson, esti senĉese trompataj, tiom ke ni devas ekuzi la mensogon.

De tio naskiĝas la bezono bremsi tiun ĉi vivstilon, tro koncentrita sur la tujaj profitoj. En la libro de la Sentencoj ni trovas longan liston de la diversaj falsaĵoj en kiujn facile la mallertulo falas, akriĝante la rilaton kun la aliaj: *«Jen ses aferojn la Sinjoro malamas, kaj sep, Li abomenas: arogantaj okuloj, mensogema lango, manoj verŝantaj senkulpan sangon, koro preparanta malbonfarajn intencojn, piedoj rapidantaj al malbono, falsa atestanto, kiu elspiras mensogojn; kaj tiu, kiu semas malpacon inter fratoj»* (Sen 6, 16-19).

Al ni, kiuj estas tro emaj al la mensogo kaj al la duobla ludo, estis donita la oka ordono: *«Ne faru kontraŭ via proksimulo malveran ateston»* (Eli 20,16). Per ĉi tiu ordono estas petita de ni aparta atento: ke ni almenaŭ evitu atesti la mensogon damaĝantan aliulojn. Estas preskaŭ normale, ke ni en niaj rilatoj ekuzas ofte kaj

pressoché normale, ma in ogni caso è necessario evitare di arrivare perfino a testimoniare il falso, danneggiando il prossimo.

Quando san Paolo difende il suo messaggio dalle accuse dei suoi ascoltatori, ci indica la strada sulla quale possiamo incamminarci: «Dio è testimone che la nostra parola verso di voi non è “sì” e “no”. Il Figlio di Dio, Gesù Cristo che abbiamo predicato tra voi, io, Silvano e Timoteo, non fu “sì” e “no”, ma in lui c’è stato il “sì”. E in realtà tutte le promesse di Dio in lui sono divenute “sì” (2Cor 1, 18-20a).

Se in Cristo c’è stato solo il “sì”, noi pure dobbiamo essere sinceri e reali in tutto, evitando ogni storpiatura della realtà. Gesù stesso lo afferma con poche e semplici parole: «Il vostro parlare sia sì, sì; no, no; il di più viene dal maligno» (Mt 5, 37). Un ideale di vita molto difficile da mettere in pratica, ma necessario per controllarsi, per difendersi, per non affiancarsi al maligno, intessuti come siamo di fragilità e paura. L’ottavo comandamento ci dice di evitare in tutti i modi di sfruttare la fiducia del fratello, testimoniando il falso contro di lui.

Un modo sbrigativo per offendere un fratello è quello di usare una lingua che lui non conosce, obbligandolo in questo modo a subire la propria inferiorità e a fidarsi ciecamente. Lavorare per avere una lingua comune, comprensibile da tutti con una certa facilità, senza il bisogno di traduttori, ci può preservare dalla innata tendenza di imporre la propria visione della vita, prevaricando sul fratello. E se attualmente non si intravedono risultati confortanti, è bene investire sull’Esperanto, in quanto mette tutti sullo stesso piano, dando a tutti le stesse opportunità.

volonte mensogojn kaj falsaĵojn, sed ĉiukaze necesas eviti, ke ni eĉ mensoge atestu, damaĝante la proksimulon.

Kiam sankta Paŭlo defendas sian mesaĝon antaŭ la akuzoj de siaj aŭskultantoj, li indikas al ni la vojon sur kiu ni povas ekmarŝi: «Dio estas atestanto, ke nia parolo al vi ne estas samtempe ”jes“ kaj ”ne“. La Filo de Dio, Jesuo Kristo, kiun mi, Silvano kaj Timoteo anoncis al vi, ne estis “jes“ kaj “ne“, sed en Li estis “jes“. Fakte, en Li ĉiuj promesoj de Dio fariĝis “jes“» (2Kor 1, 18-20a).

Se en Kristo estis nur “jes”, ankaŭ ni devas esti sinceraj kaj realaj en ĉio, evitante ĉiun fuŝadon de la realo. Jesuo mem asertas tiun ĉi per malmultaj kaj simplaj vortoj: «Via parolo estu: jes, jes; ne, ne; ĉio ekster tio venas de la diablo» (Mat 5, 37). Viv-idealo tre malfacile realigebla, sed ĝi estas necesa por regi sin, por sin defendi, por ne alflankiĝi al la diablo, enteksitaj, kiel ni estas per fragileco kaj timo. La oka ordono postulas, ke ni evitu ĉiamaniere tro profiti la fidon de la frato, atestante la malveron kontraŭ li.

Rapidema maniero por ofendi fraton estas uzi lingvon, kiun li ne konas, devigante lin tiamaniere suferi sian malsupercon kaj fidi blinde. La laboro por havi komunan lingvon, kompreneblan de ĉiuj pro ia facileco, sen la bezono de tradukistoj, povas gardi nin kontraŭ la kunnaskitaj inklinoj altrudi la propran vidpunkton pri la vivo kaj superregi sur la frato. Kaj se nun oni ne vidas kuraĝigajn rezultojn, estas bone investi en la lingvo Esperanto, ĉar ĝi metas ĉiujn sur la saman nivelon, donante al ĉiuj la samajn oportunecojn.



Dirite inter ni ...



037

LIBROJ

- Ĉu vi posedas bibliotekon?
- Jes, mi havas sufiĉe da libroj
- Ĉu vi legis ĉiujn librojn, kiujn vi aĉetis?
- Ĝenerale mi legas la librojn, kiujn mi aĉetas, sed...
- Sed...?
- Sed kelkfoje mi aĉetas librojn por donaci ilin.
- Ĉu en tiu okazo vi legis la donacotajn librojn?
- Dependas.
- De kio dependas?
- Dependas de la situacioj.
- Ekzemple?
- Nu, se iu deziregas libron pri matematiko, mi certe ne legis ĝin antaŭe.
- Faru aliajn ekzemplojn.
- Nu unu povas deziri libron pri kuirarto.
- En tio okazo mi, komprenas, ke vi ne legos ĝin.
- Jes, temas pri libro, kiun oni konsultas.
- Kaj kompreneble, ankaŭ vortaron oni ne legas.
- Nu, tio estas evidenta, sed kiam mi komencas trafoliumi vortaron, neniam mi laciĝas.
- Kiel se vi havus enciklopedion.
- Sed evidente enciklopedio estas nur konsultota verko.
- Konsentite.

LIBRI

- Hai una biblioteca?
- Sì, ho abbastanza libri.
- Hai letto tutti i libri che hai hai comperato?
- Di solito leggo i libri che compero, ma...
- Ma...?
- Ma alle volte compero dei libri per regalarli.
- In quel caso hai letto i libri da regalare?
- Dipende.
- Dipende da che cosa?
- Dipende dalle situazioni.
- Ad esempio?
- Se qualcuno desidera moltissimo un libro di matematica, certamente non l'ho letto prima.
- Fai degli altri esempi.
- Beh, qualcuno può desiderare un libro di arte culinaria.
- In quel caso capisco che tu non lo legga.
- Sì, si tratta di un libro che si consulta.
- E naturalmente anche un vocabolario non si legge.
- Beh, questo è evidente, ma quando incomincio a sfogliare un vocabolario non mi stanco mai.
- Come se tu avessi un'enciclopedia.
- Ma evidentemente un'enciclopedia è un opera che si consulterà solamente.
- D'accordo.

- Ankaŭ telefonlibro estas libro, kiun oni nur konsultas.
- Jes, sed mi ne konsiderus ĝin libro.
- Tamen...
- Tamen, kio?
- Oni konas kelkajn spritaĵojn...
- Jes, se temas pri spritaĵoj...
- Kaj kion vi legas volonte?
- Mi havas preferon por la libroj skribitaj laŭ bona stilo.
- Nu, vi ne konsideras la enhavon, sed la formon.
- Certagrade jes, sed mi havas ankaŭ preferojn por kelkaj temoj.
- Ekzemple?
- Nu, mi legas volonte biografiojn.
- Nur tiujn?
- Ne, mi ŝatas detektiv-romanojn.
- Kaj ankaŭ... ?
- La rakontoj pri vojaĝoj..
- Ĉu sufiĉas?
- Kelkaj libroj, kiuj ŝercas pri ĉio, povas ankaŭ esti interesaj.
- Pri ĉio?
- En la limoj de la deco, kompreneble.
- Ĉu vi legas nur librojn en la itala lingvo?
- Ne, mi zorgas ankaŭ pri aliaj lingvoj, kaj mi devas esti daŭre ĝisdatigita.
- Ĉu en la senco, ke vi devas ĉiam legi la novaĵojn?
- Ankaŭ en tiu senco, sed ĉefe mi ne volas perdi miajn prilingvajn konojn.
- Tio estas bona afero.
- Jes, sed kelkfoje oni malfacile trovas librojn en aliaj lingvoj.
- Vi pravas, ne ĉiam oni trovas librojn en la hispana lingvo.
- Nur en kelkaj apartaj vendejoj.
- Anche la guida telefonica è un libro che si consulta solamente.
- Sì, ma io non la considererei un libro.
- Tuttavia...
- Tuttavia, che cosa?
- Sì conoscono alcune barzellette...
- Sì, se si tratta di barzellette...
- E che cosa leggi volentieri?
- Ho una preferenza per i libri scritti in buono stile.
- Allora, tu non consideri il contenuto, ma la forma.
- In un certo senso sì, ma ho anche preferenze per alcuni argomenti.
- Ad esempio?
- Beh, leggo volentieri delle biografie.
- Solo quelle?
- No, mi piacciono i polizieschi.
- Ed anche...?
- I racconti di viaggi.
- È abbastanza?
- Alcuni libri che scherzano su tutto possono anche essere interessanti.
- Su tutto?
- Nei limiti della decenza, naturalmente.
- Leggi solamente libri in lingua italiana?
- No, mi occupo anche di altre lingue, e devo continuamente essere aggiornato.
- Nel senso che devi sempre leggere le novità.
- Anche in quel senso, ma principalmente non voglio perdere le mie conoscenze linguistiche.
- È una cosa buona.
- Sì, ma alle volte i libri in altre lingue si trovano con difficoltà.
- Hai ragione, non sempre si trovano libri in lingua spagnola.
- Solo in qualche rivendita particolare.



LA BIKIKLO

- Vekiĝu.
- Kiu?... Kio?...
- Nu, vekiĝu
- Kial?
- Ĉu vi ne memoras? Ni devas vekiĝi frue.
- Ha, jes, vi pravas: la trejnado.
- Ĉu nun vi memoras?
- Jes, mi memoras, sed mi estis en plena dormo.
- Je ĉi tiu horo?
- Jes, kaj mi estis songanta.
- Ĉu temis pri bela songo?
- Ha, jes, estis tre bela songo.
- Kion vi songis?
- Mi songis pri... ba, mi ne plu memoras.
- Kiel kutime.
- Nu, mi pretigos min kiel eble plej rapide.
- Jes, de songo al la revado.
- Ĉu al revado?
- Jes, ĉar en via fantazio vi revas fari grandaĵojn dum la vetkuro.
- Pro tio mi deziras trejniĝi.
- Kaj mi vekas vin por akompani vin dum la trejniĝado.
- Ĉu la bicikloj estas pretaj?
- Hieraŭ ni pretigis ilin, ni kontrolis la bremsilojn, ni oleumis ĉiujn radetojn, ni atentis pri la radradioj ni nur ne pumpis la gumojn.
- Bone, vi povus pumpi la gurnojn dum mi min pretigas.
- Akordite. Sed rapidu.
- Mi estos rapidega
- Je kiom da atmosferoj mi devas pumpi la radojn de via biciklo?

LA BICICLETTA

- Svegliati!
- Chi?... Che cosa?...
- Su, svegliati.
- Perché?
- Non ti ricordi? Dobbiamo svegliarci presto.
- Ah, sì, hai ragione: l'allenamento
- Ti ricordi ora?
- Sì, mi ricordo, ma ero in pieno sonno.
- A quest'ora?
- Sì, e stavo sognando.
- Si trattava di un bel sogno?
- Ah, sì, era un sogno molto bello.
- Che cosa hai sognato?
- Ho sognato di...mah, non mi ricordo più.
- Come al solito.
- Bene, mi preparo quanto più presto possibile.
- Sì, dai sogno al sognare.
- Al sognare?
- Sì, perché nella tua fantasia sogni di fare cose grandi durante la corsa.
- Per questo desidero allenarmi.
- Ed io ti sveglio per accompagnarti durante l'allenamento.
- Sono pronte le biciclette?
- Ieri le abbiamo preparate, abbiamo controllato i freni, abbiamo dato l'olio a tutte le rotelline, abbiamo fatto attenzione ai raggi delle ruote, solamente non abbiamo pompato le ruote.
- Bene, potresti pompare le gomme mentre io mi preparo.
- D'accordo. Ma muoviti.
- Sarò velocissimo.
- A quante atmosfere devo pompare le ruote della tua bicicletta?

- Se mi bone memoras, je 7 la antaŭan kaj je 7-8 la malantaŭan.
- Ĉu ne estas tre multe?
- Ne, ankaŭ se mi sentos ĉiujn ŝtonetojn, kiujn mi trafos sur la strato.
- Mi kontrolos pri la atmosferoj
- Kie?
- Sur la gumoj.
- Sur la gumoj?
- Jes, ĉu vi neniam rimarkis, ke sur la gumoj de la biciklo estas indikitaj la atmosferoj?
- Neniam.
- Vi ne konas tro bone vian biciklon.
- Pro tio, ke vi zorgas pri ĝi.
- Mi interesiĝas pri ĝi, sed ankaŭ vi devas ĝin koni
- Vi pravas: mi klopodos lerni ion alian de vi.
- Bone, sed nun preparu vin.
- Ĉu vi povas dume zorgi pri la manĝaĵo?
- Jes ankaŭ pri tio mi zorgos.
- Ni manĝos dum ni pedalos.
- Jes, sed estas pli bone, ke vi mangu ion antaŭ la forveturo.
- Mi tion faros.
- Kiom da kilometroj ni iros?
- Cento ĝis cent dudek kilometrojn.
- Ni povas bicikli dum maksimume kvin horoj.
- Tio sufiĉas.
- Nu ne parolu, agu.
- Kiam ĉio estos preta, ankaŭ mi estos preta
- Se ricordo bene, a sette l'anteriore ed a sette-otto la posteriore
- Non è troppo?
- No, anche se sentirò tutti i sassolini che incontrerò sull'asfalto.
- Controllerò le atmosfere.
- Dove?
- Sulle gomme.
- Sulle gomme?
- Sì, non hai mai notato che sulle gomme della bicicletta sono indicate le atmosfere?
- Mai.
- Non conosci troppo bene la tua bicicletta.
- Per il fatto che te ne interessi tu.
- Mi interesse di essa, ma anche tu devi conoscerla.
- Hai ragione: cercherò di imparare qualcos'altro da te.
- Bene, ma ora preparati.
- Puoi nel frattempo interessarti di ciò che mangeremo?
- Sì, mi interesserò anche di quello.
- Mangeremo pedalando.
- Sì, ma è meglio se mangi qualcosa prima della partenza.
- Lo farò.
- Quanti chilometri faremo?
- Da 100 a 120 chilometri.
- Possiamo pedalare per un massimo di cinque ore.
- È sufficiente.
- Bene, non parlare, datti da fare.
- Quando tutto sarà pronto, sarò pronto anch'io.





Nia eta Parnaso



Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

VENTO CALDO

*Vento caldo africano
sulla riarsa terra di Sicilia
tra i mandorli spogli
d'agosto.*

*Da lontani ricordi
l'eco mi giunge
dell'antico carrettiere
il canto,
melanconico lamento
d'araba origine, struggente,
nell'aria greve.*

*Sulla strada sterrata
polverosa
stridevano le ruote
dondolando
nell'afa meridiana,
e l'eco di quel canto grave
varcava i burroni,
entrava negli anfratti
e nei meandri viscerali
dei ricordi*

(Anna Amorelli Gennaro)

VARMA VENTO

*Varma afrika vento
sur sekigita tero de Sicilio
tra senfoliaj migdalarboj
dum Aŭgusto.*

*El foraj memoroj
atingas min reeĥo
de la antikva ĉaristo
la kanto,
melankolia lamento
je araba origino, korprema,
en la peza aero.*

*Laŭ senpavima strato
polvoplena
knaris la radoj
balanciĝante
en tagmeza varmego
kaj la eĥo de tiu prema kanto
transiris la abismojn
eniris la anfraktojn
kaj la profundajn meandrojn
de la memoroj*

(esperantigis Norma Cescotti)

Verbale dell'Assemblea UECI 2015

Addì 24 maggio 2015 alle ore 10:30 nella sala conferenze del Centro di Spiritualità "Madonnina del Grappa" di Sestri Levante il presidente Giovanni Daminelli apre la seduta con il seguente ordine del giorno:

1. Elezione degli organi operativi dell'assemblea (segretario e scrutatori)
2. Lettura e approvazione verbale dell'assemblea precedente
3. Relazione morale e finanziaria 2014
4. votazione per l'elezione del nuovo Comitato Centrale e per l'approvazione delle relazioni morale e finanziaria
5. Programma di attività 2016
6. Bilancio preventivo 2016
7. Varie ed eventuali.

Sono presenti 12 soci e sono state presentate 6 deleghe.

1. Viene nominato come segretario della seduta il socio Francesco Ottino.
Vengono inoltre nominati come scrutatori i soci Maria Bertorelle e Norma Cescotti.
Vengono successivamente distribuite le schede elettorali. Si possono votare al massimo sei candidati tra quelli elencati sulla scheda.
2. Si passa alla lettura del verbale dell'assemblea precedente che viene approvato all'unanimità.
3. Il presidente relaziona sull'entità dell'associazione e sulle attività dell'anno trascorso. Vengono enunciate le entrate e le spese effettuate che vengono minuziosamente esaminate. Viene inoltre presentata una panoramica delle attivi-

tà espletate dai vari gruppi dell'UECI in ambito nazionale. Infine il presidente legge in sintesi le varie voci delle entrate e delle uscite ivi compreso il patrimonio di base dell'associazione.

La socia Norma Cescotti espone alcune difficoltà di invio postale dei bollettini. Dopo breve discussione si passa al punto successivo.

4. Nella votazione tramite la scheda consegnata dagli scrutatori, verrà indicata anche l'approvazione sia della relazione morale, sia della relazione finanziaria. Contestualmente verrà votato il Comitato Centrale UECI per il triennio 2015-2018.

Si passa al controllo e verifica delle votazioni. Votanti presenti 12, votanti per delega 6, votanti per lettera 14. Totale 32 votanti.

Alle ore 12.00, si decide di sospendere la seduta, per partecipare alla S. Messa. Si riprenderà lunedì 25 maggio alle 10,15. Alla ripresa le scrutatrici consegnano al presidente i risultati delle votazioni che vengono comunicati all'assemblea.

Risultano eletti:

1	Giovanni CONTI	voti 29
2	Giovanni DAMINELLI	voti 26
3	f. Pierluigi SVALDI	voti 26
4	Tiziana FOSSATI	voti 25
5	Norma COVELLI	voti 17
6	Carlo SARANDREA	voti 17
7	Felice SOROSINA	voti 16
8	Ida BOSSI	voti 12

Hanno inoltre ottenuto voti:

9	Giovanni GAZZOLA	voti 10
10	Gabriella ZANNI	voti 5
11	Marco POLITI	voti 2

5. Si passa alla previsione delle attività del prossimo anno.

Interviene il socio Giovanni Conti che segnala la ricorrenza del 30° congresso UECI del prossimo anno per cui propone di organizzare un congresso in località particolarmente affascinante al fine di suscitare un desiderio partecipativo, constatata l'esiguità dei convenuti nell'attuale anno. Per questo si potrebbe decidere per una quota di partecipazione molto bassa.

Vengono avanzate due proposte: Padova, con gita sul Brenta e Assisi con visita ai luoghi francescani e non solo.

Viste le difficoltà di raggiungere Assisi con il treno si potrebbe prenotare di un pullman che faccia tappa alla stazione di Bologna (o in diverse stazioni di raccolta) per il trasporto ad Assisi. Il nuovo Comitato Centrale affronterà il problema anche con un preventivo sondaggio di adesione.

6. Il bilancio preventivo rispecchierà quello dello scorso anno non essendo previsti incrementi di spesa
7. Non essendoci altro da decidere il presidente dichiara chiusa l'assemblea alle ore 12.15 di lunedì 25 maggio 2015.

*Il segretario
Francesco Ottino*

Papa Francesco nel Tempio Valdese

Il 22 giugno 2015, a Torino, Papa Francesco è stato il primo Papa ad entrare in un tempio valdese: 841 anni dopo la nascita del movimento dei «poveri di Lione» fondato dal mercante Valdo, ed 831 dopo la scomunica di Papa Lucio III.

Secoli di persecuzioni, stragi, discriminazioni (solo nel 1848 Carlo Alberto di Savoia riconobbe ai valdesi i diritti civili).

Francesco ha mormorato: «Da parte della Chiesa Cattolica vi chiedo perdono per gli atteggiamenti e i comportamenti non cristiani, persino non umani che, nella storia, abbiamo avuto contro di voi. In nome del Signore Gesù Cristo, perdonateci!».

Il centro valdese è, in Italia, a Torre Pellice (Piemonte).

Ed ecco i rapporti tra i valdesi e l'Esperanto:

- prima e dopo il primo conflitto mondiale, l'Esperanto fiorì a Torre Pellice, specialmente ad opera del pastore valdese Alessandro Vinay;

- nel 1967, si svolse a Torre Pellice il Congresso del KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia; Lega Internazionale Cristiana Esperantista).

Antonio De Salvo

Papo Francisko ĉe la Valdano Templo

La 22-an de junio 2015, en Torino, Papo Francisko estis la unua Papo kiu eniris en valdanan templon: 841 jarojn post la naskiĝo de la movado de la «malriĉuloj de Lione» fondita de komercisto Valdo, kaj 831 post la ekskomuniko de Papo Lucio III.

Jarcentoj da persekutoj, amasbucadoj, diskriminacioj (nur en 1848 Karlo Alberto el Savojo rekonis al la valdanoj la civitanajn rajtojn).

Francisko flustris: «Flanke de la Katolika Eklezio mi petas vian pardonon pro la sintenoj kaj la kondutoj ne kristanaj, eĉ ne homaj, kiujn, en la historio, ni havis kontraŭ vi. En la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo, pardonu nin!».

La valdana centro estas, en Italio, en Torre Pellice (Piemonto).

Kaj jen la rilatoj inter valdanoj kaj Esperanto:

- antaŭ kaj post la unua mondmilito, Esperanto prosperis en Torre Pellice, precipe pro la agado de la valdana pastoro Alessandro Vinay;

- en 1967, okazis en Torre Pellice la Kongreso del KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia).

Antonio De Salvo





Leteroj al la redakitejo

Rubrica a disposizione dei lettori. Rubriko je dispono de la legantoj.

Prezidanto Daminelli, mi daŭrigas en-
kikipediigi artikolojn pritraktantajn temojn
de la kristana, precipe katolika, religio,
ĉerpante el la katolika dokumentaro kaj
katolikaj katekismoj, krom kompreneble
de mi mem, kaj ofte apogiĝante en tiuj
samvoĉaj italaj aŭ francaj aŭ anglaj... Tiu
laboro absorbas mian tempon laŭlonge
de 7/8 horoj ĉiutage kaj tiun de mia edzi-
no (kelkaj horoj por kontroli tradukaĵon
kaj serĉado en bibliaj vortaroj). Mi hieraŭ
atingis (post pli ol kvin jaroj) la nombron
de 2.559 artikoloj per tiu pri la “Katolika
Bioetiko”.

Kiel mi jam diris, ĉiu el tiuj artikoloj
(serioze kontrolitaj ne nur de mi) estas
averaĝe vizitataj 15 fojojn monate (iu
malpli iu pli). Temas, do, proksimume pri
 $2.559 \times 15 = 38.385$ vizitoj.

Amikoj esperantistoj diras ke tiuj vizi-

toj estas ankaŭ tiuj de la stevaroj kiuj
atente relegas; sed tiu ritmo konserviĝas
ankaŭ fore de la stevarda kontrolo.

Aliaj amikoj opinias ke temas pri es-
ploristoj neesperantistoj kiuj scivole kla-
kas el aliaj lingvoj kaj tuj foriras allasante
senvolan spuron! Sed ankaŭ tio ne tute
kontentigas ĉar la allasita spursigno havas
diversan longon kaj, krome, la Esperanto
uzata estas la plej simpla. Kaj la nombro
estas tiom granda, ke meritis analizon
kaj studinterpreton de konsiderintoj, eble
ankaŭ ene de la kristanaro esperantista.




Armando Zecchin

La fortuna di chiamarsi Francesco

Nel sito dell' ISTAT compare la statistica dei nomi più diffusi dati ai bambini nati
in Italia dal 1999 al 2013. Negli ultimi anni il nome più diffuso è Francesco, per i
maschi, Sofia per le femmine. Confrontando la statistica del 2012 con quella del
2013 si nota l'incremento del nome Francesco in concomitanza con l'elezione del
Papa Vedi: <http://www.istat.it/it/prodotti/contenuti-interattivi/calcolatori/nomi>

Maschi	2012	2013	Femmine	2012	2013
Francesco	7.978	10.553	Sofia	8.266	7.987
Alessandro	7.925	7.235	Giulia	8.194	7.313
Andrea	7.674	6.777	Giorgia	5.326	4.772
Lorenzo	7.281	6.747	Martina	5.157	4.538
Mattia	6.634	6.289	Emma	4.971	4.536



Aliĝo al 21° Ekumena Kongreso

AVERTO

La organizantoj de la kongreso sendis ĉi tiun sciigon:

Post la 1a de Julio ne plu eblos aliĝi al la ekumena kongreso en Strasburgo. Restas do malmulte da tempo por aliĝi.

GIOVANI CONCORRETE

L'UECI dispone di n° 3 premi da 500,00 € ciascuno da assegnare a giovani di età compresa tra i 18 e 30 anni, iscritti all'UECI che conseguano il diploma di esperanto di terzo grado. I premi saranno erogati quale contributo per la partecipazione a un congresso dell'UECI o dell'IKUE. Gli interessati si rivolgano al presidente UECI

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2015

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l' associato ordinario e 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I*
codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPIITRXXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

NUOVO COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S.Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Segretario/cassiere: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 035.932298 –

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

Novaj najbaroj

Sinjorino iom maldiskrete observas la sintenon de paro de geedzoj, kiuj venis loĝi en la najbara domo.

Post kelkaj tagoj ŝi raportas al sia edzo:

– Ŝajnas, ke ili vivas en bona harmonio: li kisas ŝin ĉiam, antaŭ ol foriri, kaj de la strato li mansignas al ŝi afable.

Kial anakŭ vi ne faras tion?

– Dio mia..., mi ankoraŭ ne konas tiun virinon.

Obezo

Kuracisto diras al paciento tro peza:

– Se vi piediras 10 km ĉiutage, post unu jaro vi atingos la ĝustan pezon.

Post unu jaro telefonas la paciento:

– Doktoro, mi nun havas la ĝustan pezon, sed nun estas alia problemo: mi estas fore 3650 km.

Belkantisto

Belkantisto intervjuata pri sia kolego diras:

– Li kantas mirinde, kiel vere elstara artisto.

– Li diras la malon pri vi.

– Eble ni ambaŭ eraras.

Teatra aŭtoro

– Fraŭlino, mi ĝojas, ke vi kaj viaj gepatroj finlegis mian tri-aktan teatraĵon. Kion vi opinias pri ĝi?

– Ni ĉiuj opiniis, ke unu el la tri aktoj estas tute necesa.

– Kiun akto?

– Ĉiu el ni tri proponis malsaman akton.

Sportemulo

Homo estas pasie partiano de futbal-teamo. Li ĉeestas ĉiun futbal-ludon, ĉiutage li legas en la gazeto pri la estintaj ludoj kaj prognozojn pri la estontaj.

lun vespero reveninte hejmen post futbalmatĉo li trovas sian edzinon larmanta.

– Kial vi ploras?.

– Vi konas nur vian futbalon kaj nenion alian. Vi eĉ ne memoras la tagon de nia geedziĝo!

– Certe ke mi memoras! estis la tago de derbio Milan-Inter: Milan venkis per 3 goloj kontraŭ 2.

Batoj

Ebriulo, vangofrapas sian edziniĝintan filinon.

Ŝi ekploras:

– Neniu amas min! hejme mia edzo batas min, kaj ĉi tie batas min mia patro.

– Stultulino. Mi ne celis vin, sed vian edzon: li batadis mian filinon, kaj mi batas lian edzinon...

Angla proverbo

Ne bruligu kandelon ĉe ambaŭ pintoj.

p://www.ueci.it/k_sento/ks_2015/

